Nun mi volas mencii ion pri arkivado de eltranĉaĵoj priesperantaj Mi rekomendas al tiuj rondetoj de junaj esperantistoj, kiuj ankoraŭ ne faras tion, ke ili nepre kolektu ĉiujn artikolojn kaj sciigojn pri Esperanto el ĉiuj atingeblaj gazetoj. Multaj certe ridas, dirante, ke temas pri komprenebla afero, sed tamen ekzistas kelkaj, mi kredas, kiuj ne kolektas ilin, aŭ se kolektas, do malbone.

Al tiuj mi volus doni kelkajn konsilojn. Por ke artikoleto pri Esperanto estu vera dokumento, ĝi nepre estu ordigita en kolekton. Tio signifas, eltranĉi la titilon de la gazeto kun dato kaj numero kaj sub ĝi alglui la koncernan eltranĉaĵon. Poste la tuto estu fiksita sur samformataj paperoj aŭ en albumo.

La kolekton, kiu de tempo al tempo kreskos, nepre uzu ĉiuokaze, parolante kun dubantoj aŭ mokantoj pri nia afero. Al mi persone okazis, kiam mi prezentis la subskribfolion de UEA por subskribi, ke iu ulo diris: „Rudé právo ankoraŭ ne skribis pri Esperanto, do mi ne subskribos." Vidu, kio povas okazi!

Kaj kion pri l' nomo Esperanto? Ni skribu kaj parolu prefere pri Internacia lingvo, ol nur pri Esperanto. Spertuloj de la Esperanto-movado rekomendas tion kaj Esperanto jam nepre meritas esti tiel nomata, post 80 jaroj de ĝia uzado en tuta mondo. Ĉu ne? Kaj skribante en la ĉeĥa aŭ slovaka lingvoj pri Esperanto, neniam uzu la majusklon "E". Ankaŭ la uzado de „samideán" en la nacia lingvo tute ne taŭgas!

Ĉe la fino mi petas ĉiujn rondetojn de junaj esperantistoj, ke ili bonvolu de tempo al tempo sendi por la centra arkivo de JS ĈŤEK, almenaŭ unu specimenon de materialo, informa, varba aŭ alimaniere poresperanta, kiun vi sukcesis multobligi, presigi aŭ aperigi ielmaniere. Okaze faru kaj sendu eĉ fotojn de ekspozicietoj, montrokestoĵoj aŭ aliaj E-aranĝoj. Memoru nur, ke al Praha venas sufiĉe ofte elstaraj eksterlandaj esperantistoj, al kiuj ni povos montri la rezultojn aŭ nur erojn de nia laboro. Vi ja scias, ke ni havas ankaŭ taŭgan ejon (Centro de junaj esperantistoj, Jeĉná 8, Praha 2) kaj dum la internacia seminario apud Praha, ni aranĝos ekspozicieron, kie E-junularestroj el tuta Eŭropo povos konatiĝi kun nia laboro.

Ni fidas je via kunlaboremo, geamikoj!

Karel B a r t o ŝ í k
informa fako de JS ĈŤEK

ĈETLI JSTE „STUDENTA" ?.

V 8. čísle celostátního studentského časopisu vyšel článek o esperantu a rozhovor s Mikulášem Nevanem. Zároveň byl otištěn úryvek z „Babičky", k němuž byla vyhlášena soutěž.

K 22. březnu obdrželo vedení naší sekce několik desítek dopisů jako reakci a ohlas na uveřejněný článek. Pisatelé většinou žádají učebnice a slovníky, event. informaci, kde se esperantu učít. Redakce Studenta nám oznámila, že se soutěže zúčastnilo více než 100 čtenářů, z nichž bylo 10 vylosováno a odměněno knihou.

!!! V čísle 12/1967 čtete: ...kromě správného řešení nás mnozí čtenáři pochválili za článek, který jsme o esperantu uveřejnili, i za to, že tento jazyk tak neotřele propagujeme...

Marie Jirásková

ĈU VIA URBO, FABRIKO, FOIRO, KTP. ELDONIS ESPERANTAN PROSPEKTON ???

Ni planas doni al ĉiu eksterlanda partoprenonto de IJES apud Praha saketon kun prospektoj pri Ĉeĥoslovakio, sed prefere en Esperanto. Se E-rondetoj havas provizeton de E-prospektoj kaj bildkartoj, ni ĝoje akceptus almenaŭ 40 ekzenplerojn (eĉ malpli). Ĉu vi povos fari ion en tiu ĉi afero? Bonvolu sendi almenaŭ sciigon.

Antaŭdankon! K.B.

UNUA OFICIALA BULTENO

de la 23-a Internacia Junulara Kongreso de TEJO venis antaŭ kelkaj tagoj el Natanja, Israelo.

(daŭrigo de Zpravodaj 1/67, paĝo 10)

En Israelo estas 2.526 600 loĝantoj. Inter ili estas 2 240 200 judoj, 202 300 islamanoj, 55 500 kristanoj, 28 600 druzoj kaj aliaj. El la judoj 31,9 % venis el Eŭropo, Ameriko kaj Oceanio, 14,9 % el Afriko kaj 13,8 % el Azio.

En Israelo estas 26 urboj, 43 aliaj urbaj lokoj, 760 vilaĝoj kaj aliaj loĝlokoj (inter ili estas la "kibucoj").

Plej grandaj urboj:

1. Jerusalemo (187 500). La ĉefurbo de Israelo. La spirita kaj kultura centro de la juda popolo en la tuta mondo. Ĉi tie estas la supera juĝejo, nacia muzeo, universitato kaj multaj sanktaj lokoj.

2. Tel Aviv (393 300). La plej larĝa urbo. Estis fondita en 1909. Komerca, industria kaj turista centro. Bela marbordo, teatro, filharmoniejo, urbaj muzeoj, galerioj kaj universitato.

3. Haifa (200 800). La ĉefa haveno de la lando. Tie estas rafinejo de nafto, fabrikoj de vitro, teksvaroj kaj metalurgio, la Tehniono (Israela Tehnika Instituto), urbaj muzeoj kaj teatro, Bahaa templo kaj ĝardeno (monda centro de la Bahaoj).

4. Natanja (60 000). Situas 30 km de Tel-Avivo, 70 km de Nezarete, 100 km de Ejlat - la plej suda urbo en Israelo ĉe la Ruĝa maro.

Provizora programo:

merkredo (9.8.67) - komuna veturo de Tel-Avivo al Natanje, renkontiĝo kun la Golfo, interkona vespero

ĵaŭdo (10.8.67) - komuna bano en la maro, solena inaŭguro, promenado tra Natanja (muzika sunsubiro), akcepto de la urbestro

vendredo (11.8.67) - ekskurso al Cezario, kunsido de TEJO, Israela arta vespero kun loka junularo

sabato (12.8.67) - sportaj konkursoj, kunsido de TEJO, prelego pri Israelo, filmo, lumbildoj, teatraĵoj

dimanĉo (13.8.67) - inaŭguro de Zamenhof-strato, vizito de fabrikoj, diskuto, oratora konkurso, internacia vespero

lundo (14.8.67) - ekskurso al la „galil" (Genazeret lago)

mardo (15.8.67) - tutan tagon en kibuco: labora brigado, prelegoj, „kumzico" - komuna vespero ĉirkaŭ fajro kaj elekto de miss Esperanto

merkredo (16.8.67) - solena fermo

X-X-X-X-X-X-X,X-X-X

ESPERANTO PENETRAS EN UNIVERSITATOJN

De oktobro 1966 funkcias lektorato de Esperanto en la Universitato Nikolao Kopernik en Toruń - Pollando. Esperanto estas nedeviga studobjekto samrange kun la lingvoj hispana, itala kaj sveda. Studas 52 gekursanoj, la ekzameno rajtigas instrui Esperanton en lernejoj. En Pollando lektoratoj de Esperanto ekzistas ankaŭ en Jagiellona Universitato kaj Pedagogia Alltlernejo, Krakovo; Universitato en Lodzo; Silezia Politeknika Gliwice.

Ĉetli jsmo za vás ...

"SMER" - Banská Bystrica, 15.2.1967

Zajímavý, rozsáhlý článek o esperantu končí těmito slovy:

Dvacet let od vyvraždění Hirošimy vlastní každý větší stát na světě ničivý atomový arsenál. Osmdesát let od veřejného vystoupení dr. Esperanto (Zamenhof) se lidstvo oficiálně nedohodlo na společném celosvětovém jazyku...

„Pionýrské noviny" - Bratislava

tisknou na pokračování kursu esperanta, který vede Vojtěch Heimlich. (Poznámka redakce Zpravodaje: informujte o tom zájemce z řad mladých!)

"PRAVDA" - Bratislava, 16.2.1967

Článek s titulkem: Nastupují profesori esperanta

...Esperanto se zavádí už i na školách: bratislavská filosofická fakulta zná jedenáct posluchačů, ze kterých se brzo stanou profesori esperanta, neboť esperanto čím dál tím více ožívá...

„JIHOČESKÁ PRAVDA" - České Budějovice, 17.2.1967

Rubrika: Drobnosti z esperantského světa

... stále více se tento jazyk stává pojítkem mezi národy. Jen namátkou uvidíme fakta z poslední doby: V Paříži vydali učebnici srovnávací geologie v šesti jazycích, mezi nimi esperanto. V knižnici Oriento-Okcidento vyšel esperantský překlad veledíla argentinské literatury José Hernandese "Martin Fierro".

"SVOBODNÉ SLOVO" 9.3.1967

...V celém světě, lze zaznametat vlnu nového zájmu o esperanto, jež usnadňuje dorozumění mezi národy bez ohledu na jejich geografickou vzdálenost a jazyk, jímž hovoří. Není proto divu, že tato vlna zasáhla i film, a že v USA vznikl první pokus o celovečerní hraný snímek v esperantu (cetere ne la unua; rimarko de Zpravodaj). I když nic nevíme o jeho uměleckých kvalitách, jde v každém případě o zajímavý podnět, který by mohl vést k větší universálnosti filmového umění.

"PRŮBOJ" 5.3.1967

Pod titulkem Esperantisté v Jablonci nad Nisou vyšla zpráva o setkání esperantistů Severočeského kraje a zasedání ČSEV, z níž vybíráme: ...esperantisté v Jablonci mají řadu plánů: propagovat území Jablonecka, založit zimní kolej esperanta, která by měla rekreační charakter, vydávat prospekty a pohlednice, zřídit nepretržitou tlumočnickou a informátorskou službu po dobu LVT, navázat užší spolupráci se Skloexportem a Jablonexem, organizovat týdny mezinárodního přátelství...

„STUDENT" č.8 z 21.2.1967

Tento list studentů přinesl obsáhlý článek K.Vlachové o esperantu a interview s M.Nevanem. Článek vzbudil velký ohlas mezi mladými lidmi, z nichž mnozí nám velmi nadšeně píší. Chtějí přijít do kontaktu s esperantisty, chtějí se učit. Žádáme proto místní kroužky, aby podchytily tento zájem prostřednictvím svých okresních listů, nebo jiným způsobem. Stává se, že mladí lidé čtou Studenta, ale o místním kroužku esperantistů nic nevědí.

Esperantskou výstavu uspořádá v létě esperantský kroužek při Klubu pracujících ve Skutči. Tlumočíme zde prosbu vedoucího kroužku Fr.Roušara o zapůjčení esperantské vlajky (na stěnu), esp. vlaječek stolnicích a portrétu dr. Zamenhofa. Může-li některý z blízkých E-kroužků, p o m o z t e.

Historio de Esperanto sur poŝtmarkoj

En lastjara 24-a numero de Osvětová práce (ĉijare Neděle) ni legis mallongan informon pri s-ano Dolfá Bartošík, kies filatela kolekto sub titolo "Historio de la Internacia lingvo Esperanto" estis distingita en la Tutŝtata filatela ekspozicio Brno 1966 per arĝenta medalo kaj diplomo. Tiun ĉi informon ni kompletigas per kelkaj detaloj. La ekspozicia ĵurio esprimis sin pri la kolekto jene: "Tre bone ellaborita kolekto pri malofta temo, ilustrita per taŭga poŝtmarka kaj alia filatela materialo. Plaĉa kaj neta aranĝo estas tre alloga." La kolekto konsistas el ĉiuj esperantaj poŝtmarkoj ĝis nun emisiitaj en la mondo, kaj el granda nombro da kovertoj kaj poŝtkartoj kun oficialaj poŝtstampoj uzitaj okaze de Universalaj kaj naciaj E-kongresoj, konferencoj, renkontiĝoj en diversaj landoj. En la kolekto estas ankaŭ poŝtmarkoj pri eminentuloj, kiuj jam en pasinteco esprimis sin tre serioze pri la ĝenerala enkonduko de la Internacia Lingvo, ekzemple: Komenský, Descartes, Leibniz kaj aliaj. Plie la kolekto enhavas ankaŭ poŝtmarkojn kun portretoj de diverslandaj esperantistoj, kiel ekz. Tolstoj, Ciolkovskij, Tito, S. K. Neumann kaj aliaj.

La kolekto de s-ano D. Bartošík, nombranta nun preskaŭ 300 albumfoliojn, estis unuafoje parte ekspoziciita jam en la Tutmonda ekspozicio de poŝtmarkoj „Praga 1962".

Post sukcesa elmontrigo en Brno 1966, la kolektanto ricevis oficialan inviton partopreni per sia E-kolekto en la Tutŝtata filatela ekspozicio en Karl-Marx-Stadt, DDR, en oktobro 1967 kaj certe oni vidos parton de la materialo ankaŭ en Ostrava, kie okazos en junio ĉ.j. Tutŝtata laŭtema ekspozicio de poŝtmarkoj.

Do, nun restas ankoraŭ okazo por deziri al nia priesperanta kolektanto multajn pliajn

sukcesojn en la filatela mondo, precipe pro tio, ke ankaŭ tia laboro danas al la publiko bonan bildon pri unu el multaj uzoj de Esperanto kaj ĝia disvastigo.

K.B.

ESPERANTO EN RADIO (nur eŭropaj stacioj)

| | | | |
|-----------|------------------------------|-------------|--|
| Warszawa | ĉiutage | 16.30-17.00 | 50,42 m;48,90 m;42,11 m;41,99 m; 41,18 m;31,01 m; |
| Budapest | ĉiutage | 20.30-20.45 | 240 m;48,1 m;41,55 m; |
| Roma | dimanĉe | 17.35-17.50 | 30,90 m; 41,24 m; |
| Sofie | dimanĉe | 21.05-21.30 | 50,68 m; |
| | lunde | 00.30-00.55 | 31,38 m; 49,42 m; |
| Bern | lunde | 13.00-13.08 | 13,98 m; 16,88 m; 31,46 m; 48,66 m; |
| | merkrede | " | " |
| | ĵaŭde | 22.45-22.53 | 22,40 m; 31,46 m; 48,66 m; |
| | sabate | " | " |
| Wien | marde | 17.50-18.00 | 577 m; 293 m; 25,45 m; |
| | vendrede | 15.30-15.40 | 203 m; 46 m; 25 m; |
| Gdańsk | merkrede | 07.45-08.00 | 230 M; |
| Zagreb | vendrede | 00.05-00.30 | 264,7 m; |
| Beograd | vendrede | " | 439 m; |
| Hilversum | vendrede | 23.45-23.55 | 298 m; |
| Valencia | lunde | 19.00-19.15 | 193,m; |
| BC-London | lasta vendredo de ĉiu monato | 21.30-21-40 | 49m; 25m; 31m;19m: |

NI ELEKTIS POR VI EL ESPERANTA GAZETARO

REVUO ESPERANTO - januaro 1967, n-ro 734/1

Lingva batalo ĉe UN kaj UNESCO

. . . La analizo montris, ke la nombro de naciaj lingvoj uzataj - en internaciaj rilatoj, anstataŭ malkreski, kiel neinformataj personoj ofte supozas, multiĝas, de jaro al jaro kaj kreas senfinajn komplikaĵojn. La enkonduko de la t.n., laboraj lingvoj, ne nur ne solvis la problemon, sed eĉ aldonis novajn komplikaĵojn, ĉar la lukto inter la lingvoj vastiĝis... ..La kostoj de multlingveco estis taksitaj je kelkaj centoj da milionoj da dolaroj jare... ..Unu delegito eĉ menciis intrigojn kaj diskriminacion rilate la francan lingvon. Respondeca persono certe ne faros tiajn asertojn senbaza. Do, verŝajne li pravis. Sed kio pri la hispana, same laborlingvo de UN? Kio pri la ĉina, rusa? Kio pri ĉiuj aliaj lingvoj, kiuj estas insulte traktataj kiel triarangaj?...

...La plua konsiderinda akriĝo de la lingva problemo malfermas novajn perspektivojn, ĉar ĝi necese puŝas la homaron al la sole racia solvo. Ankaŭ kelkaj ŝtatoj jam konsciis pri tio, kiel evidentigas la oficiala iniciato de 5 skandinaviaj landoj ĉe UNESCO. Danlando, Finlando, Islando, Norvegio kaj Svedio prezentis al UNESCO proponon,

ke la "ĝenerala Direktoro destinu la necesajn financajn rimedojn en la Projekto de la Programo kaj Buĝeto 1969-1970 kun la celo establi Internacian Komisionon, konsistantan el pedagogiaj, lingvosciencaj kaj teknikaj ekspertoj, por objekte konsideri en kiuj sferoj ekzistas bezono por internacia lingvo; kaj por esplori la eblecojn havigi rimedojn de komunikado por kontentigi tiujn bezonojn."

Atentu! La subskribo - kampanjo daŭras!

Laŭ decido de la Estraro la kolektado de subskriboj por la Propono al UN plu daŭros, ĝis tiu organizaĵo dones al la afero konkretan sekvon. Novaj subskrib-folioj estas ĉiam mendeblaj ĉe la C.O. de UEA, Nieuwe Binnenweg 176, Rotterdam-2, Nederlando.

"ESPERANTO" februaro 1967 n-ro 735/2

Ĉe la fondo de Esperanta klubo de la Universitato de Moskvo, la Moskva Universitata Teatra Studio prezentis en Esperanto la verkon „Cimo de V. Majakovskij. Spektis gastoj el Brazilo, Ĉilio, Estonio, Hungario, Litovio kaj Ukrainio.

La Montreala Esperanto-klubo urĝigas ĉiujn skribi esperantlingve al „EXPO-67", Montrealo, Kanado, petante informojn kaj prospektojn pri la Monda Ekspozicio.

"ESPERANTO" n-ro 734/1

UNESTENO: Universala Esperanto Stenografio

Aperis gravega libro, verkita de konataj specialistoj pri stenografio, J. J. Sturzenegger kaj H. Matzinger. Unesteno estiĝis post profunda ekzameno de nuntempaj kaj nuntempaj sistemoj kaj post vastaj lingvaj esploroj. Kunlaboris pli ol 50 personoj de diversaj landoj kaj lingvoregionoj, kio garantias maksimuman perfektecon.

Vjetnamio - La Sud-Vjetnama Nacia Liberiga Fronto komencis eldoni en Budapest bultenon "INFORMOJ" en Esperanto, pri la vjetnama milito.

„REVUO ESPERANTO" marto 1967.

En nederlanda esploro de EŬRATOMO (Eŭropa Atomenergia Komunumo) fondiĝis Esperanto-societo. Naŭ membroj el tri landoj lernas en kurso, aliaj per disktoj.

„GERMANA ESPERANTO-REVUO"

publikigis jenan mesaĝon de W. Brant, ministro de Eksteraj aferoj de GFR: „La lingva diverseco estas la plej grava obstaklo al la interpopolaj amikeco kaj kompreniĝo. La internacia lingvo Esperanto jam delonge kaj sukcese klopodas forigi tiun barieron. La sukcesoj de Esperanto estas agnoskitaj de UNESCO; La Unuiĝintaj Nacioj volas efike insisti, ke oni daŭrigu la verkon de D-ro Zamenhof. La plibonigo de la internaciaj rilatoj estu alta devo de ĉiu politika aktiva homo. La amikeca kompreniĝo inter la homoj de diversaj nacioj plifaciligas al la politiko plenumi la grandan taskon: labori por la paco".

(Rimarko de Zpravodaj: estus pli bone, se la okcident-germana registaro vere agus laŭ tiaj vortoj de sia ministro. Sed tamen ni ĝoje akceptu ĉiun pacan deziron).

„HEROLDO DE ESPERANTO" 1/II 1967

Du ambasadoroj parolas Esperanton.

Fine de novembro 1966 la Ambasadoro de Aŭstralio en Belgujo, s-ro R. Harry vizitis Rio de Janeiro en Brazilo. Li kontaktis tie kun Soveta Ambasadoro s-ro S. Miĥajlov kaj proponis samideanan renkontiĝon. La du ambasadoroj salutis sin reciproke, parolis ankaŭ en Esperanto kaj informis la brazilan ministron de Eksterlandaj Aferoj pri la progreso de la internacia lingvo, kies utilo por kontaktoj inter diplomatoj estas evidenta.

La 24-an de novembro pasintjare pereis tragike, en aviadila katastrofo apud Bratislava, Violina Stojĉkova, 19-jara esperantistino, Miss Esperanto 1964. Ŝi estis konata kaj amata de multaj junaj esperantistoj pro sia ĉarmo kaj helpemo. Ŝi laboris kiel stevardino en la bulgara aerkompanio TABSO.

„HEROLDO DE ESPERANTO" 24/II 1967

La japana socialista partio projektas enkonduki Esperanton.

La socialista partio, kiu estas la opozicia partio laŭnombre plej grava en Japanujo, publikigis la 19-an de novembro 1966 reform-projekton sub titolo: „La unua projekto de Baza Plano por reformo de la eduka sistemo". La projekto, ellaborita de la Politika Komitato por Eduko kaj Kulturo de la nomita partio, enhavas ĉapitron, en kiu la instruado de Esperanto estas eksplicite antaŭvidita en la kadro de la deviga "ĝenerala instruado".

La agado por la itala leĝoprojekto

La 3-an de decembro, per tutlanda televida programo "Sep tagoj ĉe la Parlamento", oni elsendis sepminutan intervjuon pri Esperanto kaj la koncerna leĝoprojekto. Estis intervjuitaj estroj de la itala Esperanto-movado kaj reprezentantoj de italaj esperantistoj. Tre verŝajne la venontaj monatoj estos decidaj por la sukceso de la agado, kiun, antaŭ tri jaroj, komencis la italaj esperantistoj por atingi la sopiratan agnoskon de la Internacia Lingvo kaj ĝian instruadon en mezgradaj italaj lernejoj.

Stále živé myšlenky

Myslím, že by měli být zváni na naše sjezdy vzdělaní neesperantisté, především učitelé a profesori, novináři a spisovatelé, řečníci a politikové, aby se sami přesvědčili o životnosti a působivé síle esperantských projevů, řečí a diskusí, jejichž živou bezprostředností se vyznačují naše mezinárodní konference.

D. Bartošík (Esperantista -1947)

Na světovém festivalu mládeže činí dorozumění mezi příslušníky různých národů veliké potíže. Tito ve styku mezi sebou, jakož i v obchodech a restauracích neužívají k tomu účelu ani latiny ani esperanta, nýbrž podle zprávy Čs. rozhlasu ze dne 10.t.m. - dorozumívají se většinou velmi primitivně - posunky.

Ing. K. Franta (Stráž severu-1947)

HUMORO, UMORO, MORO, ORO, O

Je nia alvoko en lasta numero de „Zpravodaj“ , ke vi provu verki aŭ traduki en Esperanton, ni ricevis nur unu kontribuadon. Kvanknm unu, tamen bona komenco. Jen ekzemplo de kunlaboro. Ni dankas al vi, amiko Peter Holba. Jen la kontribuado.

Ankaŭ argumento

SBN-ano: Kial vi ĉasas je pasintjara ĉaslicenco?

Ĉasisto: Ja, mi pafadas nur tiujn bestojn, kiuj pasintjare eskapis al mi.

Ĉasisto: Mia karega, okaze de via naskiĝtago mi pafos por vi fazanon.

Edzino: Vi estas ege atentema, sed mi kontentiĝos ankaŭ per leporo.

Tiu estas malmultekosta.

Du fiŝkaptistoj renkontiĝis

A: Hieraŭ mi kaptis en la rivero ege grandan fiŝon. Ĝi estas preskaŭ du metrojn longa.

B: Tio estas nenio. Mi kaptis antaŭhieraŭ en la sama rivero brulantan kandelon.

A: Vi certe ŝercas.. Ja tio ne povas esti, ke la kandelo brulu en la akvo. Tio ne povis okazi!

B: Do bone! Duonigu vian fiŝon kaj mi estingos mian kandelon.

0-0-0-0-0-0-0-0

Ni ankoraŭ aldonas kelkajn aforismojn verkitajn de juna ĉina esperantisto Armand Su el japana gazeto OOMOTO:

Viv' sen lukto -

arb' sen frukto.

Por la genia verko

estas nenia ĉerko.

Viv' sen celo -


bark' sen velo.

Viro, kiu nur generi scias,

pri la propra rolo ne konscias.

Se amiko pasas sen saluti,

al li vi preferu ankaŭ muti!



".... a esperanto taky umíš?
(Květy, 11. března 1967)

FUNDAMENTA PRINCIPARO DE INFORMADO PRI LA INTERNACIA LINGVO (mallongigita)

(Akceptita en la kunveno de la reprezentantoj de la Informaj Fakoj en Frostavallen, Svedujo, la 30-an de julio 1956).

I. C e l o

1. Tri branĉoj de aktiveco: informado; instruado; praktika utiligo.

Nur paralela, bona studita kaj celkonscia agado sur la tri kampoj povas doni kontentigajn rezultojn kun daŭra valoro.

2. La celo de la informado: a) diskonigi la Internacian Lingvon kaj ĉion kio estis kreita en ĝi aŭ pere de ĝi b) detruigi la antaŭjuĝojn, precipe en la ŝlosilaj pozicioj de la kulturo kaj de la publika vivo c) instigi al lernado de la lingvo kaj altiri novajn adeptojn al la movado.

III. O r g a n i z o

5. Informa fako de UEA (gvidata de la ĝenerala sekretario):

a) gazetara servo: 1) bulteno kun novaĵoj en Esperanto aŭ por la landaj I.F.; en la angla kaj franca por la grandaj presagentejoj kaj por la ĉefaj gazetoj en la landoj sen movado 2) fotoservo 3) artikola servo 4) radio-servo kaj se eble televida servo. b) Kongresa gazetara servo (vidu la Jarlibron)

c) Ekspozicioj: 1) organizado de Universala Ekspozicio en diversaj landoj kaj konstanta kompletigado de la materialoj 2) Sugestoj rilate organizon de aliaj ekspozicioj laŭ la modelo de la universala.

d) Afiŝoj kaj flugfolioj: prizorgado de tekstoj kaj taŭgaj materialoj (desegnaĵoj), eventuale eldonado en diversaj okazoj kun internacia karaktero a) Filmoj, radio, televido: sugestoj al la landaj I. F. pri utiligo de tiuj rimedoj.

f/ Prelegvojaĝoj: organizo pere de la landaj sekcioj kaj vesta utiligo por informado pere de gazetoj, radio, afiŝoj k.s. laŭ la cirkonstancoj.

g) Gazetaraj konferencoj: utiligo de ĉiu pli grava evento, por aranĝo de gazetaraj konferencoj.

IV. F u n k c i o j

8. I.F. de UEA: a) harmoniigo de la tuta laboro b) rekta informado al la internaciaj instancoj kaj regionoj sen movado c) konsiloj kaj helpo per liverado de informoj, artikoloj kaj materialoj al la landaj I.F. kaj al la rektaj kunlaborantoj en la landoj sen movado.

V. M e t o d o j

11. Diversaj eblecoj : a) artikoloj b) mallongaj informoj nepre objektivaj c) publikaj prelegoj por ĝenerala publiko d) prelegoj en specialaj medioj (sciencaj institutoj, literaturaj societoj, sindikatoj, studentaj kluboj, diversaj socioj ktp.) e) radioprelegoj kaj informoj f) afiŝoj g) flugfolioj h) sloganoj i) ekspozicioj j) filmoj k) varbado de Apogantoj de UEA 1) aliaj eblecoj laŭ la landaj aŭ lokaj cirkonstancoj.

12. Nur intensa utiligado de ĉiuj eblecoj paralele efikas pozitive

VI. K v a l i t o

13. Ĉefaj eraroj: a) nomi la lingvon artefarita, helpa, verda k.s.; oni ĉiam nomu ĝin aŭ La Internacia Lingvo aŭ Esperanto

b) superflue menciadi diversajn projektojn de la komuna lingvo

c) ne distingi nete Inter Esperanto kiel vivanta lingvo kaj tiuj projektoj, se la cirkonstancoj devigas paroli pri ili

d) uzi en la nacilingvaj tekstoj esperantajn esprimojn, ekz. "samideano", "Majstro", "verdstelanoj" k.s.

e) skribi pri Esperanto en nekorekta nacia lingvo

f) nomadi la informadon pri Esperanto „propagando"

g) doni al la Esperanto-movado sektecan karakteron (tro multe da steloj, flagoj, kantado de la himno kaj aliaj kantoj en nekonvenaj tempo kaj loko, strangaĵoj en la vestoj dum la kongresoj kaj aliaj publikaj kunvenoj k.s.) La eraroj de la informado malproksimigas de Esperanto dek-milojn da personoj kaj kaŭzis ofte fortan kompromitigon de la movado en multaj medioj.

14. Por altigi la kvaliton estas necese akcenti ĉion, kio montras la kulturan kaj praktikan valorojn de la lingvo: literaturo, sciencaj verkoj, IUS, Belartaj konkursoj, delegita reto, precipe helpo dum vojaĝoj kaj en profesia laboro. La digno de ĉiuj publikaj aranĝoj respegulu la respekton, kiun la esperantistoj mem havas por la Internacia Lingvo.

VII. Konstanteco kaj Kampanjoj

15. Konstanteco: La informado devas esti konstanta dum la jaro, por ke la publiko senĉese konsciui pri la ekzistado kaj funkciado de Esperanto.

16. Kampanjoj: Specialaj kampanjoj, kun utiligo de ĉiuj metodoj, devas esti farataj antaŭ la komenciĝo de la kursoj, okaze de kongresoj, je la Zamenhof-tago kaj ĉiam, kiam por tio prezentiĝos taŭga okazo.

17. Okdekjara datreveno de Esperanto: En 1967 prezentiĝos taŭga okazo por grandstila monda kampanjo dum unu monato, fiksota interkonsente.

VIII. Medioj atingotaj

19. Ĝenerala informado: ĝi estas direktita al la larĝa publiko kaj havas la celon krei ĝeneralan favoran agordon.

20. Speciala informado: ĝi estas direktita al specialaj medioj, kies interesoj transiras la limojn de iliaj naciaj lingvoj (sciencistoj, diversaj fakulo, komercistoj, membroj kaj adeptoj de internaciaj organizaĵoj kaj movadoj) kun precipa atento al la junularo kaj la studentoj.

IX. K o n k l u d o

21. La esperantistoj mem estu pli forte konvinkitaj pri la praveco de la propra afero kaj pli kuraĝe argumentu kontraŭ la eraraj prezentoj. Ĉiu esperantisto konstante klopodu larĝigi kaj altigi sian lingvan scion. Ĉiu esperantisto ĉiam portu la esperantan insignon (ne multajn, sed unu). La informado estu ĉiam adaptita al la medio, en kiu oni faras ĝin kaj venu prefere de tiu medio mem.

22. Ĉiuj branĉoj de informado estu egale atentataj kaj paralele aplikataj. La maniero de informado varias de unu lando al la alia kaj de unu medio al la alia. Sekve, tiuj ĉi bazaj principoj estu aplikataj kun elasteco kaj kun konsidero de la apartaj cirkonstancoj.

23. La tuta agado, paralela kaj harmonie kunordigita en la tuta mondo, havu daŭre la celon diskonigi la lingvon, instigi al lernado kaj praktika aplikado de Esperanto, venki la ŝlosilajn poziciojn en la kultura vivo kaj definitive favorigi la publikan opinion al Esperanto.

(represita el la Jarlibro de UEA)

ZPRAVODAJ - orgán Sekce Mládeže ČSEV

Řídí Egon Moravec, U družstva Ideál 11, Praha 4, telef.: 43 79 94 1

Grafická úprava: Karel Bartošík, korektura Jaroslav Mařík.